

PUBLIKAJ PREZENTADOJ DE LA ZAMENHOF-JARO EN MADRIDO

Dum tiu ĉi monato februaro estis inaŭgurita en Madrido la Zamenhof-Jaro, per kiu Hispana Esperanto-Federacio, kunlabore kun Madrida Esperanto-Liceo, kunmemoros la 100an datrevenon de la forpaso de D-ro Ludoviko Zamenhof, la iniciatinto de la internacia lingvo.

La 9an de februaro okazis publika prezentado en la Publika Biblioteko de la kvartalo Vallecas. Ĝin partoprenis la direktoro de la Biblioteko, M^a Carmen García-Risco, la direktoro de la Pola Instituto en Madrido, Mirosława Kubas-Paradowska, la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, José Antonio del Barrio, kaj la direktoro de Fundación Esperanto, Manuel Pancorbo (de maldekstre en la apuda foto)

Post la prezentado estis organizita gvidata vizito al la ekspozicio montrita en la Biblioteko. Tiu loko estis elektita ĉar en la biblioteko situas la t.n. Centro de Pola Kultur-intereso de Madrido (loko por elmontrado de la kulturo de la komunumoj de enmigrintoj en la madrida regiono)



Krome, iom antaŭe, la 2-an de februaro, je la 7a vespere, la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, José Antonio del Barrio, prelegis pri D-ro Zamenhof en la palaco Cañete, sidejo de la Casa Sefarad-Israel, institucio kreita de la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj por rilatoj kun la juda kulturo. Oni speciale atentis la hebrean fonon de Zamenhof en liaj ideoj kaj verkaro. La tuta prelego estas spektebla en la reto, en la jutuba kanalo de HEF, ĉe la adreso: <https://www.youtube.com/watch?v=5aFoyYYhZ3o>.

Tuj poste, la 6an de februaron, la prezidanto de HEF estis intervjuata de Radio Sefarad, radio de la juda komunumo en Madrido. La interparolado estas alirebla rete en la adreso: <http://www.radiosefarad.com/a-100-anos-de-la-muerte-de-l-l-zamenhof-padre-del-esperanto-con-jose-antonio-del-barrio-presidente-de-la-federacion-espanola/>.

VIZITIS NIN

Saed Abbasi, irana Esperanto-parolanto, kiu de jam dek jaroj loĝas en Ŝanhajo, Ĉinio, vizitis Madridon en februaro. Li havis la okazon renkontiĝi kun kelkaj esperantaj amikoj, unue la 15an de februaro, kaj post sia vizito al Andaluzio, denove la 25an.

En tiu ĉi tago li kunvenis en la sidejo kun pluraj esperantistoj, kaj li rakontis pri siaj spertoj kaj la situacio en ambaŭ landoj.



PLANATA KURSO EN FUENLABRADA

Post la bona akcepto de la prelego en la Oficiala Lernejo pri Lingvoj en Fuenlabrada (vidu la bultenon de februaro 2016), oni nun planas organizi kurson en tiu institucio en la venonta aŭtuno. Juan del Castillo organizas gvid-instruistan grupon por laŭvice viziti tiun lernejon po unu fojon ĉiun semajnon, solvi dubojn, korekti tie ekzercojn kaj paroligi la kursanojn, kiuj devos trastudi la lecionojn hejme.

Oni nun organizas la detalojn, kaj oni planas prezentadon de Esperanto por la venonta 15a de marto, okaze de “Tago de Malfermaj Pordoj” en la Lernejo. La titolo estos: “Esperanto, comunicación sin complejos”, kaj la horo, de 18:30 ĝis 19:15.

Se iu el vi pretas kunlabori aŭ partopreni, bv. kontakti kun Juan del Castillo.

ĜENERALA KUNVENO DE MADRIDA ESPERANTO-LICEO

Kiel anoncote, la lundon 6an de februaro okazis la ĝenerala kunsido de MEL.

Estis traktataj la kutimaj devigaj aferoj, kiel informo pri la nombro de membroj (unu novaliĝo), aprobo de la kontoj de 2016 kaj de la buĝeto por 2017, aprobo de la raporto de aktivaĵoj de 2016 kaj propono pri novaj aktivaĵoj por 2017. Ili ĉiuj estis aprobitaj unuanime. Oni aprobas ke la kotizo al MEL restas sensanĝa: 12 eŭroj jare.

La kunveno aprobis la demarŝojn por okazigi en la venonta jaro 2018 iun internacian kunvenon en Madrido, profitante ke la Universala Kongreso okazos en Lisbono. Oni planas kandidati ĉefe por la kongreso de ILEI (la Internacia Ligo de Instruistoj Esperantistaj), kaj MEL kunlaboros en tiuj klopodoj kaj en la eventuala organizado.

LIBROJ DE MEL

Ene de la aktivadoj pretigataj por la Zamenhof-Jaro, la Ĝenerala Kunveno de MEL aprobis rabaton de la prezo de la libro “El hombre que desafió a Babel” je 10 € dum 2017. Oni krome faros kampanjon pri donacado de ekzempleroj aŭ specialaj rabatoj por renkontiĝoj, vizitoj kaj similaj eventoj.

Ampleksa recenzo pri la verko “Bohemiaj Lumoj” aperis en la gazeto “La Ondo de Esperanto”. Ĝi legeblas en la reto, en la adreso: <http://sezonoj.ru/2017/02/recenzo-73/>.

Listo de libroj vendeblaj en nia sidejo aperas en la retpaĝo de HEF, en la fako pri lernado: <http://www.esperanto.es/hef/index.php/aprender-esperanto/venta-de-libros>.

KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde post la 18,30.

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL <http://www.esperanto.es/mel>, kaj la liston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: <https://www.facebook.com/esperanto.madrid/> aŭ la pli ĝenerala <https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/>. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: <http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta>.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

<http://www.esperanto.es/mel/>

madrid@esperanto.es



Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com